

La kvara KKPS - ne maltrafu!

Se vi ankoraŭ ne aĉetis kalendaron ĉi-jare, tuj kuru al vendejo kaj aĉetu la plej belan kaj pompan, ĉar vi havas gravajn datojn por marki per neviŝebla skribilo:

vendredo la 30-a de oktobro ĝis dimanĉo la 1-a de novembro 2015.

Je tiuj tagoj okazos la Klaĉ-Kultura Postsomera Semajnfino, en la sudorienta pinto de Nederlando: Heerlen.



En luksa vilao en la centro ni loĝos denove kun junuloj kaj maljunuloj kune, sed ĉi-foje kun integrita programo laŭ la temo "Kune". Krom la tradiciaj halovina balo, trinkejo kaj kursoj okazos ekskursoj en la montetaro kaj diversaj unikaj prelegoj.

Kotizoj:

	Benelukso	Okcidenta Eŭropo	Resto
30+	€75	€65	€55
20-29	€65	€55	€45
4-19	€55	€45	€35
3-	€10	€10	€10

Aliĝoj post septembro pagas €10 pli, membroj de NEJ kaj aliaj asocioj pagas €10 malpli.

Eblas ĝiri la antaŭpagon de €15 al NEJ per nejk-r aŭ NL85 RABO 0147 9494 24.

Vi trovos aliĝilon, multajn informojn kaj belajn fotojn ĉe

<http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com>



Mendu vian vojaĝon tuj!



Pos-Amiko

Printempo 2015, Numero 12

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. E@I nun oficiale pli granda ol UEA

2. Savoplano por grekaj ŝuldoj malakceptita

2. Bona novaĵo por TEJO-prezidanto

2. Esperantistoj rifuĝas al Afriko

3. El la tomo de Zombenhof

3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps-klacxunveno.](http://kkps-klacxunveno.wikidot.com/Pos-Amiko)

[wikidot.com/Pos-Amiko](http://kkps-klacxunveno.wikidot.com/Pos-Amiko)

E@I nun oficiale pli granda ol UEA

Post la ŝtupoj de pli bona retpaĝo, pli multaj komencantoj, pli multaj membroj kaj pli sukcesa kongreso E@I, mallonge por Edukado ĉe Interreto, nun preterpasis la Universalan Esperanto-Asocion (UEA) en la lasta grava kampo: grandeco de oficejo. Ekde tiu ĉi sabato en la E@I-bastiono laboras 11 homoj (5 salajre kaj 6 volontule), kompare al 10 en Roterdamo (8 salajre kaj 2 volontule). La aktuala kresko estas ligita al la venontjara UK okazonta ĝuste en Nitra (SK) pro la moviĝanta centro de la movado.

En la oficejo de E@I en Partizanské nun apenaŭ estas spaco por ĉiuj laborantoj, pro tio la organizo konsideras lui aŭ aĉeti aldonan spacon en Roterdamo. P. Baláž komentas: "Estas tie iu eta asocio en multe tro granda domo, kiu certe bonvenigus nin." Baláž tamen neas la onidirojn pri starigo de rilatoj kun UN kaj Unesko: "Por ni oficialaj rilatoj kun Google kaj Facebook multe pli utilas."

La planoj por konkerado de la mondo daŭre progresas, kaj ĝia realigo estas nun planita tuj post la lanĉo de aktuale.info.

Savoplano por grekaj ŝuldoj malakceptita

N. Huurman, kasisto de TEJO: “Kvankam ni havas nun sufiĉan monon por subteni ilin, la problemoj pri Pasporta Servo estas pli urĝaj.”

Bona novaĵo por TEJO-prezidanto

Granda estas la ĝojo ĉe Łukasz Żebrowski, prezidanto de TEJO, pro alveno de bela donaco en la fino de marto. Jam multaj gratulis lin pro la okazo, kaj K. Poso ricevis jenan deklaron:

Ł: “Mi ĝojas anonci, ke post preskaŭ naŭ monatoj da laboro kaj atendado fine ĉio glate iris. Temas pri procedo, kiun ni jam ekis en 2013, kaj post komence malsukcesaj provoj nia pasintjara provo evidentiĝis sukcesa. Kaj mi ankaŭ ne pre substreku, ke mi nur iniciatis la procedon, do ĉefe gratulindas tiu, kiu faris la plejparton de laboro. Ĉiuokaze ĝi ricevos la plej bonan zorgon por plu kreski en estonteco.”

Oni povas sendi gratulojn al prezidanto@tejo.org pro la naskita administra subvencio.

Esperantistoj rifuĝas al Afriko

Estis nur antaŭ unu jaro, kiam junaj eŭropaj esperantistoj amase renkontiĝis, sur la duon-eŭropa duon-afrika insulo Sardujo, kun junaj afrikanoj ĵus rifuĝintaj al la norda mondoparto. Ekde tiam la situacio en Eŭropo multe ŝanĝiĝis, kun milito, sendependecaj movadoj, Eŭropaj voĉdonoj kaj ŝulda krizo. La gastigantoj de tiam iĝis la rifuĝantoj de nun.

Ekzemple iu Ł. Ż. petis siajn konatojn por mono por povi eliri Eŭropon kaj trovi rifuĝon en Kenjo. Krome TEJO petadas monon de la Nord-Suda Centro de la Konsilio de Eŭropo, kaj provas baldaŭ organizi IJK-on en Afriko. La espero estas, ke tiel multaj junuloj povos havi vizon por eskapi siajn hejmlandojn. La plej forta fluo de rifuĝintoj verŝajne okazos en majo por eviti la Eŭrovido-kant konkurson.

El la tombo de Zombenhof

Mia poŝtkesto denove preskaŭ eksplo-
das kun papero (mi ĉiam printas ĉiujn ri-
cevitajn retmesaĝojn), ĉi-monate pro di-
versaj alvokoj por volontuloj. Ĉiuj verdaj
asocioj ŝajnas voli, ke mi sen rekompens-
co aŭ kontraŭ ridinda poŝmono faru
ĉiujn iliajn enuajn taskojn. Bedaŭre en
tiu ĉi ekonomia situacio malfacilas trovi
veran laboron por iu de mia aĝo. Kun
miaj kvalifikoj mia nura espero estas
kandidatiĝi por la posteno de Ĝenerala
Direktoro en la Centra Oficejo de UEA.

Anstataŭe mi decidis rekonsideri mian
laboron por la Pos-Amiko, por kiu Poso
ne pagas min, kaj decidis do krei plian
alvokon por volontulo.

Ĉu vi havas ion interesan por diri? Ĉu vi
volas disvastigi viajn pensojn al la mon-
do? Ĉu vi volas senmortan famon? Tiam
nepre sendu vian verkaĵon al
kkps.klackunveno@gmail.com. Se Poso
elektas vian kontribuon, vi ricevos 50
stelojn da poŝmono por elspezi en la
trinkejo de KKPS.

-Lazaro Zombenhof

*Noto de la redaktoro: la limdato por aperi en
la sekva Pos-Amiko estas la 20-a de junio. -P*

La horoskopoj

Ŝafo: Vi trovos la kaŝitajn ovojn,
sed tiujn de la pasinta jaro.

Taŭro: Pro sukcesa dieto vi gajnos
nur unu kilogramon dum IJF.

Ĝemeloj: Vi malkovros, ke dormi
sur planko pli bonas ol dormi kun
italoj.

Kankro: Via hejmbesto finfine
komprenos viajn ordonojn en
Esperanto (sed daŭre malobeos).

Leono: Vi aĉetos grandan pakajon
de skribiloj, el kiuj neniu funkcios.

Virgulino: Post la paska meso vi
ne plu estos.

Pesilo: Via ekzemplero de la Pos-
Amiko estas en la angla kaj pro tio
vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Via kara koresponda ami-
ko evidentiĝas esti algoritmo.

Kévin Morel-Fourrier: Vi erare
lavos ruĝan ĉemizon kun la
blankaj .

Sagitario: Vi starigos grupon por
unuamemuloj.

Kaprikorno: Por ne dependi de
rusa gaso vi decidus kuiri per
bruligi furzojn.

Akvisto: Via familio decidus, kiel
venĝo, ekparoli iun lingvon, kiun vi
ne konas.

Fiŝoj: Vi lernos mil flirtfrazojn sed
ĉiujn forgesos pro streso.